Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo merkredon la 19-an de novembro 2025 per Zoom

**Ĉeestis** Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Lars Sandbakk, Claude Rouget, Harald Rygg kaj Marianne Lund.

**1. Aprobo de la tagordo**
La tagordo aprobiĝis.

**2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 8-an de oktobro 2025**
La protokolo de la pasinta estrara kunsido aprobiĝis.
Mono de legaco Uhlen: Ni prizorgu, ke la ricevota mono estu en nia bankkonto jarfine.
Esperantonia: La luantinoj vokis elektriston. La elektristo instalu la necesan nombron da ŝtopilingoj.
Venos ankaŭ spertulo pri fenestroj por doni konsilojn pri venontjaraj riparoj.

**3. Skandinava kunlaboro**
Partoprenis minimume 12 personoj el Norvegio, Svedio kaj Danio. Oni diskutis eblajn kampojn de kunlaboro, ekzemple pri revuoj, retaj kursoj, Roskilde-festivalo, biblioteko k.s. Sentiĝis ĝenerala volo je kontakto kaj kunlaboro. Venonta kunveno okazos la 10-an de decembro. Jam komenciĝis kunlaboro inter Sten Svenonius (Malmö) kaj Marianne pri reta kurso. Claude povas eventuale esplori eblajn formojn de estonta revua kunlaboro.

**4. Norvega Esperantisto 4/2025**
Redaktofino: unua semajno de decembro.

**5. Retpaĝaro**
Jardar: La redakta sistemo estas eksdata kaj bezonas renovigon. Ni devos aŭ ĝisdatigi la nunan sistemon aŭ transiri al alia sistemo. Judith esploras la alternativojn. Ni diskutu, kiom grandan retejon ni havu. Prefere estu facile ŝanĝeblaj novaĵoj. Ne indas fari grandajn teknikajn ŝanĝojn pri la nuna sistemo se ni baldaŭ transiru al nova. Transiro al nova sistemo kredeble okazos en 2026.

**6. Eventualaĵoj**
Niaj luantinoj donis al ni kelkajn proponojn pri fenestraj informiloj. Rapide rigardinte ilin ni preferas tiun, kiu havas fone la tergloban simbolon. Niaj luantinoj presigos kaj pendigos la afiŝojn en la fenestro de Esperantonia.

**7. Venonta estrara interkonsiliĝo**
La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 15-an de januaro je 20.30.

Protokolis Marianne Lund